



la informilo

ISSN:0291-6037

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série

trimestriel

1^o trimestre 1986

n° 53



abonnement

un an: 35 F

jara abono
por eksterlando:

45FF aŭ 14 R.Koj

ANTO-FLASH... ESPERANTO-FLASH... ESPERANTO

UNE "PREMIERE"

**DANS LE MONDE
COMMERCIAL
ET INDUSTRIEL**

IKEF

UN ORGANISME D'ETAT UTILISE L'ESPERANTO
DANS UNE DE SES PUBLICATIONS OFFICIELLES!

Désireuse de promouvoir, en particulier à l'étranger, les produits élaborés dans le Département, la CHAMBRE DE COMMERCE ET D'INDUSTRIE de la MEUSE vient d'éditer sous forme d'une luxueuse plaquette illustrée un répertoire complet des 195 entreprises en activité en 1986.

Bénéficiant d'un support graphique des plus modernes, cet ouvrage est rédigé en quatre langues: français, anglais, allemand... et espéranto!

Nous devons cette initiative au
DIRECTEUR GENERAL de ladite Chambre
de Commerce et d'Industrie, François-

Xavier GILBERT, espérantiste motivé, membre
du Conseil International de IKEF (Internacia Kom-

merca kaj Ekonomia Fakgrupo), groupe spécialisé qui ambitionne d'utiliser normalement l'espéranto, considéré a priori comme outil de valeur pour les relations internationales d'ordre économique.



Si vous désirez connaître (en espéranto!) la véritable épopée de la "Confiture de groseilles épépinées de BAR-le-DUC", n'hésitez pas à vous procurer cette brochure dont la diffusion est déjà assurée du succès.

A LA DÉCOUVERTE DE L'INDE... ★

M. YASHOVAR DAN, Professeur en informatique et en germanistique, vient d'entreprendre un cycle de conférences dans une série de villes françaises à l'invitation des clubs locaux d'espéranto. Au cours de ces soirées M. Yashovardan présente un panorama synthétique de la vie dans son pays et l'exposé est suivi d'un débat très ouvert sur les problèmes actuels de l'Inde. Cette formule originale de conférenciers itinérants, mise sur pied par l'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO, a déjà permis à un nombreux public d'avoir de nouvelles approches sur des pays éloignés et de prendre contact avec la Langue Internationale par le biais de locuteurs de qualité.

M. Yashovardan, sera l'hôte du club d'espéranto de BAR-le-DUC le 25 mars.

★ NOUVELLES PERSPECTIVES EN ALLEMAGNE FÉDÉRALE

Selon le journal "Augsburger Allgemeine Zeitung", le Ministre Fédéral pour l'Education et la Science à BONN vient de prendre l'initiative d'une enquête généralisée sur l'espéranto, étendue à tout le territoire de la République. Par ailleurs les instances concernées travaillent à un projet de formation de professeurs d'espéranto et à l'élaboration de matériel didactique. En même temps, dans le cadre de l'Association Allemande d'Espéranto la ligue Rhin-Westphalie (Re-Ve-Lo) s'est donné de nouvelles structures au cours d'une semaine culturelle qui réunissait à MUNSTER une centaine de personnes. De nouvelles orientations ont été définies en vue d'une intensification des relations entre groupes voisins et pour la promotion d'une action de type européen.

AIMEZ-VOUS L'AQUARELLE... ET PARLEZ-VOUS ESPÉRANTO? ★

Organisée dans le cadre des célèbres Rencontres Artistiques de Gattières, ce stage original est proposé par le Club d'Espéranto de NICE et se déroulera durant la première décade d'août 1986.

Ces "rencontres" annuelles regroupent des artistes d'origine diverses, désireux d'échanger leurs expériences. C'est un carrefour privilégié où se mêlent harmonieusement musique et peinture art et paysage... ateliers de guitare, flûte, violon, peinture sur soie, etc. Le nouveau stage "art de l'aquarelle", qui utilisera uniquement l'espéranto pourra donc apporter une dimension internationale nouvelle que la communauté artistique de Gattières appréciera sans aucun doute.

Tous renseignements auprès de: J.P. CAVELAN, 164, Chemin de Saquier, St-ISIDORE, F-06200 NICE.

★ L'ESPÉRANTO SUR LES ONDES (SUITE)

C'est en effet 1994 heures d'émissions diffusées en 4968 séquences dans douze stations qui ont été recensées au cours de l'année passée. Ce nombre ne cesse de croître depuis quatre années consécutives. Sont venues s'ajouter en 1985 les nouvelles émissions de radio-Suisse-Internationale (Berne) en direction de l'Asie, de l'Afrique et de l'Amérique qui ont commencé le 6 mai; avec 837 séquences portant sur 139 heures, Radio-Berne s'est hissée à la 3ème place après Varsovie (2196 émissions sur 976 heures) et Pékin (1464 émissions d'une durée totale de 732 heures). Deux autres émetteurs sont entrés dans cette grille internationale: budapest et Vérone. Nous ne pouvons qu'encourager nos lecteurs à se mettre à l'écoute selon les modalités techniques données par notre calendrier et à réagir par un courrier adressé aux stations concernées.

★ LE FESTIVAL FOLKLORIQUE INTERNATIONAL DE TORUN

Pour la 6ème année consécutive le musée ethnographique de TORUN (Pologne), organise une rencontre internationale réservée aux orchestres ou groupes musicaux de caractère folklorique. Du 30 mai au 2 juin 1986, les participants se produiront en différents endroits de la ville. Le but de cette rencontre est de perpétuer le monde traditionnel du folklore lié à la musique et aux danses populaires tout en permettant aux participants des contacts pulvaires tout en permettant aux participants d'établir des contacts réciproques fructueux. C'est bien entendu l'espéranto qui sera la langue-pont de ces festivités auxquelles, hormis la Pologne, la Bulgarie, la Tchécoslovaquie, la Finlande, la Hongrie et la Yougoslavie ont déjà apporté leur concours. Ajoutons que séjour et voyage sont pris en charge par les organisateurs.

L'ESPÉRANTO A PART ENTIÈRE À L'UNIVERSITÉ ★

N'en déplaise aux esprits chagrins, l'espéranto conquiert pas à pas droit de cité dans les établissements scolaires de niveau universitaire comme le montre la dernière statistique publiée par les soins de M. PIRLOT. Fin 1985 l'espéranto était officiellement enseigné ou utilisé dans 119 Facultés ou Instituts et ce dans 26 pays. Il serait intéressant de connaître la réaction de M. le Ministre de l'Education Nationale que ce genre d'information doit certainement déranger.

★ UN GRAND COLLOQUE UNIVERSITAIRE

Fin novembre, à l'Université de PADERBORN (RFA), un colloque international a réuni des spécialistes qui ont débattu de différents problèmes liés à l'interlinguistique et à la pédagogie cybernétique. Tous les échanges ont eu lieu en allemand ou en espéranto. Dans une première partie furent évoquées les nouvelles voies des méthodes générales d'enseignement, l'apport des nouvelles langues en littérature, une nouvelle approche de l'étude du chinois grâce à l'informatique, l'étude comparée du français et de l'espéranto sur le plan sémantique.

Une deuxième séquence a été consacrée à des exposés de haut-niveau: structures syntaxiques, le projet EUROTRA, l'Espéranto et la computique, etc. Signalons que le Dr Helmar FRANK, Directeur de cet Institut de Cybernétique, qui jouit d'une grande renommée dans les milieux universitaires espérantistes, s'est vu récemment décerner la médaille d'honneur de la Société Hongroise d'informatique.

DES VACANCES ALLÉCHANTES... ★

Si l'envie vous tente de séjourner en Floride, Ralph et Maria MURPHY vous attendent dans leur "Maison de l'Espéranto"... Confort moderne, terrasse, jardin fleuri, plages à faible distance, bibliothèque et discothèque privées en Langue Internationale bien sûr! Pour tous renseignements: E°-Domo, Ralph kaj Maria MURPHY, 18757 Lake Worth Blvd, PORT-CHARLOTTE, FL 33948, USA.

Plus proche sans doute -mais sans attendre le percement du tunnel- "L'Hôtel esperanto", à 8 km de LANCASTER en Grande-Bretagne, peut accueillir 16 personnes et ce dans le meilleur rapport qualité-prix. On peut même réserver l'établissement pour toutes espèces de stages ou rencontres internationales: Adresse: Mary Davies, E°-Hotelo, 2 Oxcliffe Rd, Heysham, Morecambe, LA3 1PS, G.-B.

Au cas où la Côte-d'Azur et son printemps précoce ont votre préférence, écrivez donc à Hélène STOFFERS, Villa "TABOU", Supercassis 47, F-13260 CASSIS (en allemand ou en espéranto)... vous partagerez avec ce couple sympathique des heures bien agréables!

ANGULO DE LA PREZIDANTO ★

Karaj gesamideanoj,

Informante pri esperanto, mi havas pli kaj pli ĝojigan impreson: la alparolitoj akceptas la informojn kun intereso. Dubojn pri la valoro de esperanto mem, mi apenaŭ renkontas ĉe ili. Se iuj dubas, tiam nur pri la verŝajneco de universala adopto de la internacia lingvo.

Duboj pri la lingvo bedaŭrinde ankoraŭ ekzistas... ĉe la esperantistoj! Pensu pri ĉiuj reformemuloj, kiuj opinias, ke la sistemo de la lingvo mem malhelpas disvolviĝon! Por aliaj gravas disputi pri la koloro de la blanka ĉevalo de Henriko la Kvara!

Dume realiĝas serioza kaj sistema laboro de informado, dividiĝas la taskoj kaj grandiĝas la reto de kunlaborantoj. Iuj sin proponas por organizado de staĝoj, aliaj informas pri la perkoresponda kurso, korektas taskojn aŭ instruas, ktp.

Al novaj membroj de nia asocio kaj al ĉiu ajn aktivemulo, mi direktas la jenan alvokon: eniru nian skipon, helpu nin diskonigi nian perkorespondan kurson kaj proponu vin por organizado de staĝoj! Per kelkaj horoj de ĉiutaga laboro en la jaro, vi havigos al ni novajn gelernantojn kaj novajn membrojn. Kelkajn horojn nur...

Antaŭan dankon!

Edmond LUDWIG

Helpemuloj bonvolu skribi al

Sr^o Jean-Paul COLNOT
15, Rue de Lavaux
54520 LAXOU



INTERESA INICIATO



— "SEMINARIO PRI PEDAGOGIO" —

Por instruantoj de esperanto, Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) organizas de la 29a de marto ĝis la 2a de aprilo 1986 en la Kastelo Grésillon, en BAUGE, seminarion pri pedagogio, teoria kaj praktika.

- = Didaktiko de fremdaj lingvoj (prof. COMPANYS, Universitato de PARIS VIII)
- = Didaktiko de fremdaj lingvoj aplikata al esperanto (prof. SZERDAHELY BUDAPEST)
- = Metodoj (Edmond LUDWIG, verkinto de lernolibroj)
- = Prelegoj kaj diskuttrondoj, distraj vesperoj.

Aliĝkotizo: 150 FF - ne-membroj de "GRESILLON" krompagos surloke 100 FF).

Restadkostoj (tranoktado kaj tri mangoj tage: 165FF/126FF tage, depende de la ĉambro.

INFORMAS: Renée TRIOLLE, 4 impasse des charpentiers, 57100 THIONVILLE, Francio.

NENIAM TRO MALFRUE POR GRATULI!

...Sukcesis en la ekzamenoj...

| | | | |
|--------------------|--------------------|-----------------|----------------------------|
| ATESTO PRI LERNADO | BOURGEOIS François | CLAUDEL Corinne | MICLO Marie-Claude |
| ===== | BUSSER Christiane | DAMOTTE Hélène | POIROTTE Bernard |
| | BUSSER Fritz | LAUBACHER Eric | SWICHOKA-LEONARD Françoise |
| | CAYE Arlette | MASALA Bruno | UZNANSKI Aline |

| | | | |
|----------------------|----------------|----------------|--|
| ATESTO PRI KAPABLECO | GUILLAUME René | ROUX Catherine | |
| ===== | | | |

Gratulon al ĉiuj sukcesintoj kaj al la sindonaj kursgvidantoj!

*La Direktorino de la Ekzamencentro:
Jeannine VINCENT*

| |
|---------------------------------|
| AGADRAPORTO POR LA JARO 1984/85 |
|---------------------------------|

Jen kelkaj statistikoj por komenci la agadraporton:

- | | |
|---|---|
| - Individuaj membroj de la Federacio: 158 (175) | - Membroj de G.E.E.: 24 (24) |
| - Membroj de U.F.E.: 68 (72) | - "LA INFORMILO" / Abonantoj: 225 (252) |
| - Membroj de J.E.F.O.: 6 (5) | - Kongresanoj en EPINAL: 42 |
| - Membroj de U.E.A.: 39 (41) | - Somera staĝo en MONTIGNY: 38 |
| - Membroj de T.E.J.O.: 4 (5) | - Aŭtuna staĝo en VILLERS: 71 (71) |

Realigis la jenaj projektoj en la agado:

1/ INFORMADO: uzado de multnombraj afiŝoj kaj cirkuleroj, dissendo de 69 komunikoj al la gazetoj (56 kontrolitaj), 8 komunikoj al la lokaj radioj.

2/ RILATOJ kun la instancoj de la eduka sistemo:

= Disvolvado de la agado ĉe la Akademi-Inspektoroj, kiuj publikigas niajn informojn pere de la Departementaj Bultenoj.

= Agnosko de nia Federacio de la Kultura Fakoj de la Rektor-Administracio de la Akademio NANCY-METZ.

3/ INSTRUADO de esperanto:

= Modernigo de la Perkoresponda Kurso pere de uzado de "M° 11" kaj "M° 12". Nombro de lernantoj = 32 (24).

= EKZISTO de kursoj ĉe lernejoj:

BRUYERES, PONT-ST-VINCENT, MUNSTER, SELESTAT.

en lokaj grupoj:

BAR-le-DUC, METZ, MONTIGNY-lès-METZ, MULHOUSE, NANCY.

4/ EKSPOZICIO: efika rondvojaĝo de la ekspozicio, belege modernigita; ĝi montriĝis bona propagandilo de E° (artikolo en "L'EST REPUBLICAIN" kaj en "L'ECHO DES VOSGES".)

5/ ĜENERALA PARTOPRENO en la nacia agado:

= Komenciĝo de la laboroj por la Nacia Kongreso en GERARDMER: reaktiviĝis la loka grupo en EPINAL; organizo de reklamkampanjo en GERARDMER pere de la ekspozicio en la M.C.L. (artikoloj en pluraj vogezaj gazetoj).

= Nacia agado en si-mem: nia Prezidanto fariĝis estrarano de U.F.E. fine de septembro kaj zorgas pri instruado sur la nacia kampo.

= rilatoj kun aliaj Federacioj de U.F.E.: helpo al la disvolviĝo de E° en la Federacio BOURGOGNE-FRANCHE COMTE kaj reciproka partopreno al diversaj aranĝoj ambaŭflanke. Interŝanĝoj de informoj kun la Norda Federacio.

= Rilatoj kun eksterlando: multnombraj partoprenantoj de la Federacio en AUGSBURGO dum la U.K°; bonegaj rilatoj kun BA.V.E.LO (Bada Vurtembergia Esperanto-Ligo) - Aktiva rolo de la francaj kaj germanaj gejunuloj - kaj kun S.E.L. (Sarlanda Esperanto-Ligo) - reciproka partopreno al diversaj aranĝoj.

ORIENTFRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO

_____ DEKLARO DE KANDIDATIĜO _____

Mi, subskribinto,

naskiĝinta la

en

kaj loĝanta en *

deklaras (re)kandidatiĝi kiel komitatano de la Orientfranca E°-Federacio.

En

, la

* (adreso + telefono)

Subskribo:

Bonvolu resendi al Catherine ROUX, 9 Square A. Briand, 54500 VANDOEUVRE

FINANCA RAPORTO PRI LA LIBROSERVO (1985)

| <u>Enspezoj</u> | | <u>Elspezoj</u> | |
|-------------------|------------------|---------------------|------------------|
| Poŝtĉekkonto | 734,70 | Aĉeto de libroj | 12 791,04 |
| (1/1/85) | | Aĉeto de diskoj | 1 592,02 |
| Vendo de libroj | 13 858,00 | Aĉeto de divers. | |
| " diskoj, kaset. | 1 713,50 | Esperantaĵoj | 741,41 |
| " diversaj | | Dogan- ŝanĝkontrol- | |
| Esperantaĵoj | 712,90 | mandat-kostoj | 492,80 |
| Repago de afranko | 441,95 | Afrankoj | 399,60 |
| Divers. enspez. | | Diversaĵoj | 35,00 |
| (donacoj) | 124,60 | Malpligo de ŝuldo | |
| Antaŭpago de | | al la Federacio | 100,00 |
| klientoj | 977,00 | Uzado de klientaj | |
| | | antaŭpagoj | 186,10 |
| | <u>18 562,65</u> | | <u>16 337,97</u> |
| | | Poŝtĉekkonto | |
| | | je la 31-12-85 | 2 224,68 |
| | | | <u>18 562,65</u> |

HAVO DE LA LIBROSERVO
je la 31-12-85

| | |
|---------------------|------------------|
| Libroj | 71 011,50 |
| Diskoj, kasetoj | 2 761,00 |
| Poŝtkartoj | 2 172,00 |
| Diversaj Esper. | 1 258,00 |
| Ŝuldoj al la | |
| libro-servo | 550,30 |
| Poŝtĉekkonto | 2 224,68 |
| | <u>79 977,48</u> |
| Ŝuldo al la Feder. | 1 900,00 |
| Ne-pagitaj fakturoj | 70,00 |
| Kredito de klientoj | 124,50 |
| | <u>77 882,98</u> |

REZULTO DE LA JARO

| | |
|------------|------------------|
| Havo je la | |
| 1-1-85 | 71 478,68 |
| Profito | 6 404,30 |
| | <u>77 882,98</u> |
| Havo je la | |
| 31-12-85 | 77 882,98 |

Jean-Luc THIBIAS

FINANCA RAPORTO ĜENERALA (1985)

| <u>Enspezoj</u> | | <u>Elspezoj</u> | |
|--------------------|-----------------|-------------------|-----------------|
| <u>Kotizoj</u> | | Afrankoj | |
| 90 feder.membroj | 1 620,00 | kaj sekretariaĵoj | 523,85 |
| 64 UFE-membroj | 881,00 | Propagando: | |
| | | -libroj | 215,00 |
| Donacoj | 1 438,12 | -afiŝoj | 643,45 |
| Profito de | | -sendkostoj | 190,50 |
| staĝoj | 334,50 | | <u>1 572,80</u> |
| Vendo de materialo | 47,00 | | |
| Rentumo + | | | |
| respondkuponoj | 765,56 | | |
| Repago de la | | | |
| libro-servo | 100,00 | | |
| | <u>5 186,18</u> | | |

eldonado de "La Informilo" (1985)

| <u>Enspezoj</u> | | <u>Elspezoj</u> | |
|-----------------|-----------------|-----------------|----------|
| 225 abonoj | 5 839,64 | INF° 49 (400) | 2 469,72 |
| Donacoj | 155,00 | 50 (250) | 1 316,36 |
| | <u>5 994,64</u> | 51 (320) | 1 503,32 |
| | | 52 (320) | 1 970,21 |

BILANCO

| | |
|-----------------|-----------------|
| Enspezoj Fed° | 5 186,18 |
| Elspezoj Fed° | 1 572,80 |
| | <u>3 613,38</u> |
| <u>Profito</u> | |
| Elspezoj INF° | 7 768,15 |
| Enspezoj INF° | 5 994,64 |
| | <u>1 773,51</u> |
| <u>Deficito</u> | |

SITUACIO DE LA FEDERACIO
je la 31-12-85

| | |
|----------------|-----------|
| - Havo | 6 165,61 |
| - Stoko de la | |
| libro-servo | 77 752,80 |
| - P-K° de la | |
| L°-S° | 2 224,68 |
| - Ŝuldoj de la | |
| L°-S° | 194,50 |

| | |
|-------------------|-----------------|
| Enlandaj | |
| sendkostoj | 267,74 |
| Eksterlandaj | |
| send. + materialo | 225,60 |
| Bank-kostoj | 15,50 |
| | <u>7 768,15</u> |

REZULTOJ

| | |
|------------------|-----------------|
| - Havo | |
| je la 31-12-84 | 4 325,74 |
| - Profito Feder° | 3 613,38 |
| - Deficito INF° | 1 773,51 |
| | <u>6 165,61</u> |
| - Havo | |
| je la 31-12-85 | 6 165,61 |

André GROSSMANN

.... Sume: 85 948,59 F

La deficito de LA INFORMILO malpliĝis dank' al drasta redukto de dissendo de senpagaj ekzempleroj. Espereble la nova abon-tarifo ebligas havi por 1986 sendeficitan eldonadon. Sed nia financa situacio estas en bona stato dank' al niaj malavaraĵoj donacintoj.

NANCY

NIA VIVO EN...

La vespera kurso por komencantoj nun finiĝis. Ĝin sekvas duagrada kurso per "M12", ĉiumerkrede je la 20a30, krom dum la lernejoj ferioj. La alia duagrada kurso studas la verkon de Marjorie BOULTON, "Faktoj kaj Fantazioj" la 2an kaj 4an mardon de ĉiu monato je la 18a30. Kunvenoj okazis plurfoje, la vendredon 20an de decembro ni celebris la "Zamenhof-tagon" per studo de la parolado de Dr° Zamenhof dum la 1a Universala la Kongreso, akompanata de kukoj kaj trinkaĵoj. La vendredon 7an de februaro okazis alia kunveno kun gustumado de "ruinaĵ" krespoj. Ĉeestis respektive -sed ne respektive...- 8 kaj 5 personoj. Provizore (aŭ definitive?) plia vendreda kunveno ne estas antaŭvidita (la ferioj alproksimiĝas...).

Ni aldonu, ke la lasta merkredo de ĉiu monato je la 20a30 estos dediĉata al kunveno (anstataŭ la 2a-grada kurso). Ĉiuj estos bonvenaj. La 26an de februaro ni planas eklerni E°-kantojn.

J.P. COLNOT

PERKORESPONDA KURSO

De post septembro, 66 komunikoj estis dissenditaj al la regiona gazetaro (ŝajne nur 24 gis nun aperis, do relative malmultaj. Ĝis la 10a de februaro venis 78 informpetoj kaj aliĝis 27 gelernantoj). Eble estas interese scii el kiuj departementoj venas la plej multaj informpetoj -kaj la plej multaj gelernantoj-. Jen la ciferoj laŭ departementoj: (1a cifero: informpetoj - 2a cifero: gelernantoj)

51= 17/5 - 52= 3/1 - 54= 24/8 - 55= 3/1 - 57= 15/4 - 67= 1/0 - 68= 5/2 - 70= 1/0 - 88= 4/3 - aliaj= 5/3.

Jen nun la ciferoj por la tuta pasinta lernejarso (118 informpetoj, 32 aliĝintoj):

51= 22/11 - 52= 4/1 - 54= 23/3 - 55= 4/3 - 57= 6/2 - 67= 7/1 - 68= 18/7 - 70= 3/2 - 88= 7/1 aliaj= 20/2.

Ni rimarku, ke niaj komunikoj vekas pli da intereso en kelkaj departementoj (ĉefe en 51 dank' al "L'UNION" kaj al Sr° CROCHET)... iom malpli en 54 kaj 57.

En Alzaco, el kie svarmis leteroj kaj aliĝoj antaŭ kelkaj jaroj, la intereso ne plu ŝajnas granda, ĉefe en 67, kie ni varbis nur 1 lernanton lastjare kaj neniun en la nuna jaro.

Pri la rezultoj de la perkoresponda kurso, nenio aldoniĝis al la ciferoj indikitaj en la lasta "INFORMILO". El 32 gelernantoj, 11 finlernis "M11" kaj 3 el ili finis "M12". Por la nuna jaro, mankas ĝenerale raporto de kunlaborantoj. Tamen jam finlernis 2 gelernantoj, kiuj samtempe aliĝis perkoresponde kaj partoprenis en la vespera kurso en NANCY (tiel ili povas lerni unu lecionon ĉiusemajne, eĉ se hazarde ili ne povis veni al la kurso

Temas pri 1/ F-in° Agnès HUMBERT/CLAUDE, 2/ S-r° Noel PIERRAT. Ambaŭ estas Vogezanoj sed loĝas en NANCY, kie ili studas en la Beletra Fakultato. Ili ŝatus instrui E-°n venontjare. Ili lernis en malpli ol 3 monatoj "M11".

Krome preskaŭ atingas la kursfinon... 3/ S-in° Suzanne ROMINGER, en COLMAR, gvidita de S-r° LUDWIG kaj 4/ S-r° Georges VERDIER, en GERARDMER, gvidita de S-r° THIBIAS.

Pri la kampanjo por disvastigi nian perkorespondan kurson: partoprenis ĝis nun per gluado de afiŝoj: Sin° SCHEIDEL (67 Betschdorf), Sr° GREINER (54 Foug-Toul), Sr° BARRIER (68 Hochstatt), Sr° KUENY (68 Bantzenheim), Sin° NAU (57 Metz), Sr° GROSSMANN (68 Baldersheim), Sr° LUDWIG (68 Stosswihr) kaj la E°-klubo de BAR-le-DUC. Krome Sr° Crochet (Epernav), Sin° Bernez (Chaumont) partoprenis per cirkuleroj, respondo al informpetoj. Mi dissendis al ĉiuj 50 afiŝojn, 60 cirkulerojn, 60 prospektojn pri E°. Jen la rezultoj de varbado: Sin° NAU (5 varbitoj), Sr° CROCHET (3), Sin° ROUX kaj Sr° LUDWIG (1)...

J.P. COLNOT

BETSCHDORF (norda Alzaco)

Vespere la 14an de januaro 1986, en la belega vilaĝo Betschdorf, S-r° AUNIS prelegis pri la temo "Kial la angla lingvo ne povas esti la internacia lingvo". La prelego estis tre interesa kaj bone argumentita. Atente aŭskultis la konferencon pli ol dudek personoj el la ĉirkaŭaĵo kaj la loka teatra grupo.

La francaj kaj germanaj gejunuloj aparte parolis pri la organizado de la venonta "biciklado de l' renkonto", kiu traveturos Betschdorf la 2an de aŭgusto 1986.

Se vi aspiras puran aeron, florriĉajn herbejojn,
abi-kovritajn montojn ĉirkaŭ lagoj, tiam partoprenu en la

78-a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO

en Gerardmer, la perlo de la Vozejoj,
dum Pentekosto, (de la 16-a ĝis la 20-a de majo 1986)

Rekopiu aŭ eltranĉu la aliĝilon dorsflankan, kaj sendu ĝin kun ĉeko al la kasistino de la LKK.

S-ino Madeleine Roux
9 Square A. Briand
54500 VANDŒUVRE

ĉekoj redaktitaj je la nomo:

78-ème Congrès National d'Espéranto
Caisse mutuelle des enseignants
54000 Nancy n° 193 490 60



Atentu ke, pentekoste en Gerardmer, pli svarmas la turistoj ol la hoteloj, kaj ke post februaro 1986, la LKK ne plu respondecos pri rezervado de ĉambro. Aliĝu frue!

BAR-le-DUC



La klubagado disvolviĝas daŭre kiel antaŭplanite: monata kunveno (la 1an merkredon), kie pritraktiĝas diversaj aferoj. Ĝenerale ĉeestas 6-8 personoj en tre bona etoso. La klubo aliĝis al la kampanjo federacia kaj disdonis stokon da specifaj afiŝoj pri la perkoresponda kurso. Ni notu, ke la loka gazeto ne plu alportas kiel antaŭe sian "logistikon" kaj flanke lasas la komunikojn por la publiko. Sekve, provo estis farita ĉe la Liceo POINCARÉ, sed absolute fusa organizo surloka tute ne incitis P. Denis al eventuala E°-kurso. sed absolute fuŝa organizo surloka ne permesis eventalan malfermon de E°-kurso. Interese estas noti, ke 4 gelernantoj (plenkreskuloj) de la 2a-grada germana kurso (en la kadro de la "ĝemelkomitato") petis ties gvidanton.... -hazarde P. Denis!- paralele instrui al ili esperanton! Tiu neatendita kurso ĵus malfermiĝis! Grava evento okazis, pri kio vi povas legi sur la frontpaĝo de ĉi-tiu numero: sinceran gratulon al S-r° Gilbert, kiu havas ankoraŭ fruktodonajn ideojn!

Vendredon, la 10an de januaro, dank' al la sindonemo kaj dinamismo de nia ŝatata klubano Mireille D., 20 personoj en tre "varma" etoso, festis la Zamenhof-tagon: skeĉoj, poemoj, ludoj, kantoj... kaj ege bongusta "rakleto" (?). La Karvaval-festego (21-22-23ajn de marto) febre prepariĝas. Partoprenos ankaŭ ĉijare E°-caro kaj okazos internacia vespero Mardon la 26an de marto, Sr° Yashovardan haltos en BAR por prelegi pri Hindio.

COLMAR



De post septembro 1985, la lokaj esperantistoj, post paŭzo de kelkaj jaroj, denove kunvenas ĉiujaŭde en la "centre culturel" du Centre-Eurpe. Dum la unua renkonto de tiu ĉi jaro ni havis viziton de du gesamideanoj el Brazilo. Ni aŭskultis kanzonojn kaj kursojn por Brazilanoj en esperanto. La klubo ankaŭ korespondas kun E°-klubo en Tanzanio.

CONGRES NATIONAL Pentecôte *** 1986

GERARDMER

ALIĜILO

78-a Franca Kongreso de Esperanto en GERARDMER
dum Pentekosto (de la 16a ĝis la 20a de majo 1986)

NOMO: _____

Antaŭnomo: _____

Adreso: _____

Dato: _____

Subskribo: _____

Kotizoj ĝis la

kongresan(in)o

geedzoj

junuloj (ĝis la 18-a jaro)

eksterlandano

31/03/1986

175 F

260 F

115 F

senpage

Poste

200 F

285 F

125 F

senpage

EN NIA LETERKESTO...

Tiu letero atingis nian redaktorejon*... Ni taksas ĝin diskonigenda. Niaj legantoj komprenos nian decidon forigi personajn detalojn el la teksto...

* sendita de Jacqueline LEPEIX, federacianino el STRASBURGO, kiu ricevis ĝin rekte el RUMANIO.

----- 1986/01/07

Estimata -----

Skribas al vi juna malespera Rumano. Tute certe, vi ne ricevas ofte similajn leterojn, tial mi antaŭdankas vin pro la atento, kun kiu vi legos mian veleteron.

Mi naskiĝis antaŭ preskaŭ 30 jaroj ĉi-tie, en vilaĝo -----/----- distrikto ----- Rumanio. Kvankam dum multaj jaroj mi lernadis kaj laboris en urbo -----, nun mi loĝas denove ĉe miaj gepatroj, en vilaĝo, ĉar mi estas senlaborulo nepagata. Mi estas informatikisto, sed nur malmulte praktikis mi tiun laboron.

Mi ne estus skribinta al vi tiun leteron, se ĝi ne estus rilatanta al homaj rajtoj (fakte ne la letero sed mia malespera situacio).

Kiel skribite, mi estas senlaborulo nepagata, car antaŭ 3 jaroj, mi decidis elmigri pro la samaj homaj rajtoj (tute ne respektataj ĉi-tie). Sufice facile mi havigis mian elmigran pasporon sencivitanecan fine de julio 1984. Ekde tiam mi vizitis aron da ambasadoj por ricevi enirvizon. Jen, pasis unu jaro kaj duono, kaj eĉ ne unu ambasado respondis favore al mia peto. Tiele la landoj, kies reprezentantojn en Rumanio mi vizitis, respektas la homajn rajtojn (Kanado, Usono, Britio, Aŭstralio, Francio, Finnlando, Svedio, F.G.R.). De ĉi mi ricevis nur neajn respondojn. Kial? Ĉar la migrado de oriente-okcidenten ne estas bone taksata... estas eĉ nedezirata. Mia situacio estas ĵupli malfacila, des pli mi ne rajtas labori sed devas pagi mian restadon en Rumanio. Miaj gepatroj aperaŭ sukcesas travivi siajn malfacilaĵojn kaj jen, nun, ankaŭ min, ili devas monhelpi. Enkalkulante, ke nur mia patro laboras, la situacio estas ankaŭ pli malfacila.

Mi decidis elmigri kaj tion mi faros (kiam?), sed nur oficiale. La kompetentaj rumanaĵ organoj liberigis al mi pasporton, sed tio ne sufiĉas por forlasi la landon. Fakte ili observis la rajton elmigri, sed kien enmigri dum neniu akceptas min?... Alispeca pruvo pri la observo de homaj rajtoj!

Mi ne skribas al vi por mendi helpon (fakte mi eĉ ne scias, kiamaniere vi povus helpi min) sed por konatigi mian situacion (ne izolata) al vi, kaj pere de vi ankaŭ al aliaj.

La geesperantistoj interhelpas sin, sed ne ĉiam, tio eblas, tial mi ne atendas de vi helpon, nur konfirmon pri la ricevo de tiu letero.

Por pli bone prezenti min, mi sciigas al vi, ke mi esperantiĝis antaŭ pli ol 5 jaroj, kaj fervore agadis por E^o tie-ĉi (spite seriozajn malfacilaĵojn). Mi estas UEA-membro (pere de Fondado Caruto) ekde 1981. Krom rumane kaj E^on mi parolas bone france kaj bone angle. Dum multaj jaroj mi laboris kiel ĉiĉerono, eĉ franclingva.

Pro facile divenblaj kaŭzoj, mi ne povas tro multe skribi al vi, tial mi finas tie-ĉi mian leteron, salutante vin samideane.

Sincere via... -----

Pascal MARTIN
149, Rue A. Croizat
54510 TOMBLAINE

... Impreso de unu el niaj staĝanoj (VILLERS-lès-NANCY, oktobro 1985)...

"... Sur l'ensemble du stage: ambiance très bonne, décontractée mais studieuse; rencontre de gens de différents milieux, âges et origines; bonne ambiance de travail, bonne organisation, pas de temps mort, horaire respecté; accueil chaleureux.

Formation par la "METHODO 10"... Un animateur compétent et pédagogue (M. Ludwig); groupe homogène, manuel adapté; bibliothèque très riche... Pour le côté négatif: prix du stage relativement élevé ne comprenant même pas la fourniture du document de travail... Le prix du Cours par Correspondance, cher également, pour une langue universelle qui voudrait s'élargir...

Dans l'ensemble je suis très satisfait de ces deux demi-journées d'initiation à l'espéranto et j'encourage vivement tous ceux qui ont les moyens matériels (financiers et temps) et intellectuels, d'apprendre cette langue."



"PROFESSEURS PRIVÉS DE LANGUE...?" (...KIAM LA P.T.T. FRENEZIĜAS!...)

Kiel sciante, la diversaj esperantistoj enskribitaj en la "profesiaj paĝoj" de la telefona jarlibro fariĝis de 2 jaroj, ne plu "profesoroj de esperanto", sed "privataj lingvo-instruistoj". Tial, de 2 jaroj, mi ricevas regule, ĉu telefone, ĉu letere, ĉu petojn pri lernado, ĉu proponojn por kunlaborado en la instruado, ĝenerale de la angla lingvo.



Regule, mi informas tiujn personojn pri Esperanto, kaj samtempe petas ilin skribi al la telefona oficejo en NANCY, ĉu por protesti ĉar ne plu aperas la specialaĵo de la diversaj instruistoj, ĉu por peti la liston de la serĉataj instruistoj (do ĝenerale pri la angla).

Finfine, la lastan leteron ricevitan kun kunlaborad-propono pri la angla mi tute simple plusendis mem al la telefona oficejo kun peto, ke oni bonvolu sendi al la skribintino la liston de instruistoj pri la angla. Telefone la PTT-oficejo informiĝis pri mia deziro, kaj promesis komuniki mian peton al la Ministerio. Mi sugestas, ke ĉiuj esperantistoj enskribitaj en la "flavaj paĝoj" faru same, transsendante ĉiujn petojn erare ricevatajn sekve al ilia enskribo en la t.n. paĝoj, kun protesto kaj peto pri restarigo de la rubriko: "Professeurs d'Espéranto". La adreso por MEURTHE-&-MOSELLE estas:

Direction Régionale des Télécommunications de Lorraine
Direction opérationnelle de Nancy
3, Bd Joffre, BP 4007,
54039 NANCY-CEDEX - tél.: 83 38 81 11

J.P. COLNOT

★★★★ plus rapide... plus efficace ...
NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS "QUATRE ÉTOILES"!

